do. Kiam *Marsh* en 1882 estis nomata ĉefpaleontologo de la Geologia Mezurad-Oficejo en Vaŝingtono, li sonorilsignalis la sekvan boksistan raŭndon pri ostoj: li deklaris la fosili-kolekton de *Cope* nacia propraĵo kaj konfiskis ĝin. Sekvis koteca interbatalo en la gazetaro, dum kiu *Cope* sukcesis konsiderinde damaĝi la reputacion de *Marsh*. Finfine la t.n. ostomilitoj donis al la scienco kun la determinado de 1600 vertebrulfosiliaj specioj vastan sciencan bazon por pluaj esplorlaboroj – kaj por la du konfliktemaj kverelemuloj eternan famon. (2008-07-10)

## Banano bananoforma

Ĝi ĉiam aspektas same kaj ĉiam laŭguste samas – tamen ni ne volas malhavi nian bananon de la specio *Cavendish*. Ĝi estas la mondvaste ĝenerale komercata specio. Aktuale ĝi estas duoble endanĝerigita. En la Malaja arĥipelago, Indonezio kaj Aŭstralio jam tutaj plantejoj estas neniigitaj pro ŝimo kaŭzanta "Panamomalsano-speco-4", kiu infektas la radikojn de bananostaŭdoj. Pesticidoj tute ne helpas. La panamomalsano-speco-4 tamen ankoraŭ ne atingis Mezan Amerikon kaj Karibikon – nura afero de tempo – sed tie disvastiĝas jam la ŝimo "*Nigrasignatora*". Kun la *Cavendish*-pereo oni povas kalkuli en la daŭro de la sekvaj ok jaroj, ĉar tiu ĉi specio estas nur plantebla kiel markoto, do kiel klono. Ĉiuj provoj kruci posteulojn ĝis nun malsukcesis. Tiu ĉi problemo jam antaŭe okazis. En 1960 ŝimo neniigis la tiam dominantan specon *Grosmichel*. Maljunuloj certe memoras, ke la tiamaj bananoj estis pli dolĉaj. Kaj la sekva unuforma-unuspeca-unugusta banano? (2008-08-11)

## Malfacila muŝkaptado

Muŝoj ne kapablas – kiel japanaj papilioj, abeloj kaj burdoj – movi siajn okulojn sendepende de la kapo. Tiun malavantaĝon ili egalige kompensas per ĉ. 5000 malgrandaj ĉelarforme aranĝitaj okuloj, nomataj facetaj aŭ kompleksaj okuloj, kiuj kunmetas la bildon mozaike el rigardopunktoj. Tiu bildo ne estas tre preciza, sed, anstataŭe, donas tre rapidan diseriĝadon. Dum homo perceptas malpli ol po 24 bildojn en sekundo kiel "apartan movofazon" (do kvazaŭ kiel unuopan bil--don), la muŝo kapablas po 200 bildojn en sekundo. Spekti filmon estas por muŝo kvazaŭ diapozitiv-prezentado, kaj nian kaptontan manon ili vidas alveni al si en lantmova rapideco. Oni do devas esti tre lerta kaj rapidega por resti sub la muŝa reagotempo. (2007-11-06)


# Scienca Revuo Vol. 59 (2008) (4) / n-ro 215

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Decembro 2008 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj


Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

### Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ro David Kelso*<br>*5, Craigenhill Rd., Kilncadzow*<br>*GB – Carluke, ML8 4QT* | *<davidekelso@yahoo.co.uk>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara*<br>*Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**
**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**

***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***